

LA SANKTA KOMUNIO

En siaj paroloj Jesuo nin avertis pri la tempo de pereco. Kiel ĉefan signon de la alvenonta katastrofo indikis Jesuo agadojn de la falsaj profetoj. Antaŭ ili ni devas esti singardemaj, por ne iĝi viktimoj de la trompo. Ilia efika ilo kiel trompi la kredantojn, estas heroldado de duonveroj. Pri la ĝenerale disvastigitaj duonveroj sin apogas ekzemple iuj opinioj pri maniero de akceptado de Eŭkaristio. Se hodiaŭ volas la kredanto respondece decidi, kiamaniere li volas akcepti la sanktan komunio, li devus unue sin konatigi kun la tuta problemaro. Akceptado de la Eŭkaristio sur la manon estas metata en konekson kun liturgia reformo. El tiuj, kiuj entuziasmiĝas por akceptado de la komunio sur la manon, ne multaj tamen konsciiĝas, ke tiu ĉi nova komuniana maniero havas kun la Koncilio komunan nur tion, ke oni ĝin komencis praktikadi ĝis en la periodo de la postkoncilia sendisciplineco. En la konciliaj dokumentoj kaj en la liturgia reformo mem oni trovas nenium pravigon por tiu ĉi praktikado.

Tiu ĉi maniero de la komunio estas rekomendata kiel onidira reveno al antikva kutimo de la Eklezio. Tia maniero, per kiu oni nuntempe „povas“ komunii, verdire neniam en la Eklezio ekzistis. Hostion laikulo neniam tuŝis per siaj fingroj, nek per la nuda mano, sed dum certa tempo el manplato de la dekstra mano kovrita per vualetto ĝin prenis rekte per sia lango kaj lipoj. Ekde la tempo, kiam havas la aŭkaristia pano hodiaŭan formon de oblado, la Eŭkaristio estis ĉiam donata rekte en la buŝon surbaze de decido de la koncilio en Rouen el la jaro 650. Kontraŭ la komunio en la buŝon tiam kontraŭstaris iu hispana sekto ĝis sinodo en Cordoba en la jaro 839. Ekzistas neniu historia dokumento, ke iu papo en la historio rekomendis aŭ eĉ ordonis disdoni la Eŭkaristion sur la manon.

Regas la opinio, ke la akcepto de la ko-

munio estis siatempe enpraktigita kaj al neniu estas permesite kontraŭ tio oponi. Sed la plej gravajn oponojn kontraŭ la komunio sur la manon oni povas trovi rekte en dokumento Memoriale Domini, per kiu estis tiu ĉi maniero sub certaj kondiĉoj escepte allasita. La akcepto de la komunio sur la manon estis nenie legale „enpraktigita“, sed nur „permesita“. Pri tiu ĉi permeso oni povas diri tion, kion diris la Sinjoro: „Moseo donis al vi la permeson, sed nur pro malmoleco de via koro.“ Kiam tiun praktikadon oni komencis arbitre en Nederlando, avertis la papo Paŭlo la Sesa en sia encikliko *Mysterium fidei* antaŭ „jam disvastigitaj falsaj opinioj“ kaj alvokis nederlandajn episkopojn, ke ili ĉiurimede klopodu alkonduki reen la kredantojn al la tradicia maniero de disdonado de la komunio. Kardinalo Jäger el Paderborn skribis: „Mi rememoras, kiel malfacila estis traktado kun papo Paŭlo la Sesa, kiam ni klopodis konvinki lin, ke li por Germanio permesu disdonadon de la komunio sur la manon! Trifoje ni tiucele vizitis lin kune kun kardinalo Döpfner kaj unufoje li eĉ antaŭ ni fermis la pordon.“ La kardinalo Döpfner tion fine tre bedaŭris: „La homoj nune alvenas por la sankta komunio kiel iam ili venadis por la benita akvo.“ „Du jarojn mi klopodis pri tio. Neniam mi tion farus, se mi sciус, kiujn tio havos konsekvencojn. Sed nune mi bedaŭrinde ne scias, kiamaniere tiun aferon malfari. Se mi sciус, ke la disdono de la komunio sur la manon kaŭzos tiom da malhonorigo, neniam mi pri tio klopodus.“ En lasta vivperiodo la kardinalo al neniu plu donis la sanktan komunio sur la manon. Johano Paŭlo la Dua en la encikliko *Pri la mistero kaj honorigo de la Plejsankta Eŭkaristio* el la 24.2.1980 skribis: „En kelkaj landoj iĝis kutimo komunii sur la manon... Sed eĉiĝas tre laŭtaj plendoj pri okazoj de bedaŭrinda manko de la honoro al la Eŭkaristio, la agado, kiu tre grave ŝarĝas

ne nur konsciencan de la apartaj personoj, sed ankaŭ de la paŝtistoj de la Eklezio“. Kardinalo Seper († 1981), iama prefekto de Kongregacio por Instruo de la Kredo, diris: „La demando de la disdono de la komunio sur la manon ne estas por mi demando de la formo, sed demando de la kredo, kaj kun tio ankaŭ la demando de la konscienco de la pastroj.“ Episkopo de Regensburg Graber diris en la jaro 1970: „Nia nacio devus esti unue edukita al la pli granda honorado de la Eŭkaristio, por ke ĝi mem por si postulu akceptadon de la komunio sur la manon.“

En dokumento *Memoriale Domini* oni skribas: „Kiam la Eklezio profunde penetris en la veron kaj valoron de la eŭkaristia mistero kaj ĉeesto de Kristo en ĝi, el estimo al la Plejsankta Sakramento kaj el motivo de humileco ĉe ĝia akceptado estis enpraktigita maniero, ke mem la pastro metas la parteton de la konsekrita pano al akceptanto de la komunio sur la langon. Tiu ĉi maniero de disdono de la sankta komunio devas resti ĉe nuntempa stato de la Eklezio konservita. Ĝi baziĝas ne nur sur la praktikado dum kelkaj jarcentoj, sed ĝi estas ankaŭ esprimo de la estimo al la Eŭkaristio. Neniel ĝi malaltigas personan dignecon de tiu, kiu tiamaniere aliras al tiel grava sakramento. Pli multe ĝi subtenas lian personan dispozicion, kiun la gracoplena akcepto de la Korpo de la Sinjoro postulas“ (kmp. s-ta Aŭgusteno, *Ennarationes* en Psalmo 98,9 Pl 37, 1264).

La dokumento tiuafere apeliĝas al durtriona plejmulto de 1233 episkopoj, kiuj la novan manieron de la disdono de la Eŭkaristio rifuzis. Se iu laŭjure esploras, kiel povis la disdono de la Eŭkaristio disvastiĝi en la tuta mondo, li devus konkludi, ke ĝi okazis kontraŭleĝe, ĉar allasi ĝin rajtis la episkoparaj konferencoj nur en tiuj regionoj, kie ĝi jam antaŭe senpermeso disvastiĝis kaj kie estus tre malfacile realigi revenon al la origina dezirinda stato. Eĉ ne en unu lando, kie ĝi estis leĝigita, estis plenumita la baza kondiĉo: ke ne okazos malkreso de la necesa

eŭkaristia estimo. Mem la germanaj episkopoj supozas, ke en iliaj diocezoj ĝis 40 % de la donitaj komunioj estas sakrilegiaj.

Ke la disdono sur la manon ne estas celo de la Eklezio, ilustras kazo de sudamerika episkopo Mons. Juan Rodolf Lais, kiu sin starigis kontraŭ propra episkopara konferenco kaj rifuzis en sia diocezo disdonadon sur la manon permesi. Lian sintenon skribforme aprobis prefekto de Kongregacio por Sakramento kaj Kulto kardinalo Estevez, ankaŭ Kongregacio por Kredinstruo, kies prefekto estis la nuna Ŝtatsekretario kardinalo Tarcisio Bertone. Tiu episkopo estis laŭdita, ke li konsciencie respektas instrukcion De modo Sanctam Communionem ministrandi, kiu ordonas al ĉiu episkopo funde en sia konscienco pripensi, kiujn sekvojn povas la ŝanĝo de la maniero de disdono de la Eŭkaristio kaŭzi.

Nia Malamiko trovis insidan manieron kiel ĝin akceptigi. Tiun ĉi lian manovron ni povas indiki kiel „ĝeneraligan kutimon“. Certa praktikado konsekvence de (ofte intenca) nesufiĉa informiteco en la Eklezio kaj en la pensado diskrete ekloĝas kaj ĉiuj ĝin akceptas kiel memevidentan, kvankam ĝi neniam havas iun pravigon. Disdono de la komunio sur la manon estis verdire neniam plene ĝeneraliga kaj memevidenta alternativo de la disdono, kiel oni hodiaŭ ĝenerale opinias. Tiel same ekestis kutimo, ke la kredanto, kiu ricevis la sanktan hostion sur la manon, paŝas flanken aŭ malantaŭen, kvankam la instrukcio Redemtionis Sacramentum (art. 92) ankaŭ Enkonduko de Meslibro klare difinas, ke la komuniiganto estas devinta tuj rekte antaŭ la sacerdoto enmeti la sanktan hostion en la buŝon kaj darfas ĝin nenien en la mano forporti. (Enmeti la sanktan komunio dumire – tio jam estas esprimo de la totala malhonorigo.) Tutklare tie ankaŭ tekstas: „Se ekzistas danĝero de la sakrilegio, oni ne disdonadu la sanktan komunio sur la manon.“ Tiu ĉi danĝero minacas precipe ĉie en la urboj, kie la pastro (kaj ofte

ankaŭ laikulo) disdonas la Eŭkaristion al tute nekonataj personoj kaj lasas ilin kun ĝi foriri. Tio validas ankaŭ ĉe disdonado de la sankta komunio sur la manon al la infanoj. Tio estas tute maltaŭga kiel el la spirita, tiel ankaŭ praktika vidpunkto. (Kiel unu el avertaj ekzemploj povas esti germana paroĥo Neuss, kie la pastro trovis en la preĝlibroj de la infanoj post la sankta meso ses konsekritaj hostioj.)

Memevidento kontraŭstaranta la supre cititajn instrukciojn estiĝis, ke en multaj lokoj tute „memevidente“ disdonas la sanktan komunion kromordinare komisiitaj laikuloj aŭ akolitoj eĉ ĉe duonplena preĝejo, kvankam nek multalveno nek eksterordinaraj cirkonstancoj postulas ilian „eksterordinaran“ helpon. Ni ne miru, kiam la praktikadoj de silente akceptataj kutimoj validigas ankaŭ en grava morala sfero. Certe ne estas hazardo, ke en la samaj landoj, kie la episkopoj veemente klopodis pri disdonado de la sankta

komunio sur la manon, frapŝis encikliko de la papo Paŭlo la Sesa Hunanae vitae sur duran oponon, ĉar kondomo jam enhejmiĝis kiel bona amiko ankaŭ en multaj katolikaj familioj. Por la eklezia praktikado ne estas direktodonaĵoj disvastigitaj kutimoj, sed la kredo, estimo kaj disciplino.

La novtempa kutimo fari al malgrandaj infanoj kruceton sur la frunto estas bela alpaŝo. Sed ĉu estas ĝusta, ke la mano de la pastro alterne tuŝas la sanktan Hostion kaj la kapon? Ĉu tio estas dignoplena „anstataŭaĵo de la sankta komunio“? Ekzistas ja eĉ okazoj, ke por ricevi la „anstataŭan kruceton“ venas eĉ la junularo kaj plenkreskuloj. Per tiu ĉi tute neliturgia faro oni jam ne povas krei eraran opinion, ke ekzistas iu anstataŭaĵo por la Korpo de la Sinjoro. La infanoj certe meritas benon kaj atenton, sed poste multe pli dignoplena kaj konvena estas, ke ili alvenu por la beno post la sankta meso, kiel oni tion praktikas en kelkaj preĝejoj. ■

(El semajngazeto Světlo 48/2008)